FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

Nº 36a (nova serio) - Nº 121a - Junio 1976

**Prizorgas :** Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN .

**Eldonita de :** la ESPERANTO - Grupoj de la Ruena Regiono .

**Sendu la manuskriptojn antaŭ la :** 10a de februaro - 10a de majo - 10a de aŭgusto - 10a de novembro -

**UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE :** c.c.p. : ROUEN 283 40 H .

**Kotizoj :** Por 1976 : Minimuma kotizo : 5,00 Fr. Subtenkotizo ek de 10,00 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno sen membreco : 5,00 Fr.

" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "


# POST LA KUNVENO EN YPORT

Nia Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj kunvenis denove en Seine Maritime, sed tamen partoprenis la ĝeneralan kunvenon kelkaj gesamideanoj el sud-normandio. La etoso de nia renkontiĝo estis varma pro la simpleco de la organizado, sed ankaŭ pro tio, ke tiaj kunvenoj pli kaj pli oftaj (Val de Saane, St Valéry en Caux) ebligas pli kaj pli bonan interkonatiĝon inter la ĉeestantoj. Tiuflanke, la nova formulo de niaj instancoj superas la antaŭajn kongresojn kiuj estis tro solenaj.

Ankaŭ kor-varmaj estis la regulaj kunvenoj de la estraro dum la interkongresa periodo. Tion bone perceptis la anaro kiu aprobis unuanime la raportojn, kaj re--elektis la 2 elirintajn estraranojn.

Ankoraŭfoje tiu evento ne estis okazo por propaganda tentamo, tion ni devas bedaŭri , ĉar propagando restas unu el la plej malfortaj punktoj de nia agado. Fakte, ni ne plu scias kion fari por venki apation kreskantan. La estraro de via Unuiĝo ne disponas ian miraklan rimedon. Ni devas tamen daŭre penadi por trovi novajn metodojn. Ni ŝatus ke ĉiu el vi profitu la okazon de libertempa ripozo por cerbumi pri tio.

Nun alvenis la tempo de ferioj. Ni esperas ke multaj el vi vizitos ESPERANTUJON tio estas : internaciaj kongresoj aŭ vizitoj al eksterlandaj korespondantoj. Ni devas kiel plej ofte vivi nian esperantecon. Tio rekuraĝigos nin kaj ĉiuj, reveninte,sin sentos fortaj por aktivi por nia idealo.

Al ĉiuj ni deziras bonan libertempon ! Petro KIJO.

Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais . DEPOT LEGAL : 2e Trimestre 1976
.Le gérant : P. LEMARCHAND.

# PROTOKOLOJ

## ĜENERALA KUNVENO de U.N.E.

YPORT 11/5/76

La ĝenerala kunveno de U.N.E. okazis en la kadro de la jara renkontiĝo en YPORT, kiun ĉeestis pli ol 30 personoj el la tuta provinco, kiuj dum 2 tagoj povis vivi en gaja etoso, ludi, promeni kaj eĉ bani en la maro dank'al la bela vetero.

Sro QUILLAUD malfermis la kunvenon kaj salutis la ĉeestantaron. Poste oni aŭdis la agadraporton de Sro POTTIER, kiu montris, ke U.N.E. havis sufiĉe viglan vivon dum la jaro (kreskiĝo de la membraro Zamenhof-Tago, agado apud la deputitoj..) kaj la financan raporton de Sro JOUIS, kiu montris la bonan staton de la kaso. Ambaŭ raportoj estis aprobitaj.

Sro QUILLAUD legis la tekston de la letero sendita kun du broŝuroj al ĉiuj Normandaj Deputitoj, al kiuj 5 respondis favore, kaj de la dua letero sendita al la nerespondintoj antaŭ nelonge. Ĝis nun 4 deputitoj respondis pli malpli favore al tiu dua letero.

Tiam oni aŭdis raportojn pri la vivo de diversaj grupoj : Grand Quevilly, Rouen, Lisieux, Livarot, Caen, Le Havre, Yvetot, Trouville kaj Fécamp.

Post la raportoj okazis la elekto de la novaj estraranoj : Sroj DELAUNAY kaj LEMARCHAND elirantaj estraranoj, estis reelektitaj.

Projektoj :
Ni daŭrigos nian agadon apud la deputitoj por subteni la leĝ-projekton, kaj ni provos kontakti la ĝeneralajn konsilantojn.
Ni provos okazigi novan Zamenhof-Tagon, kaj eble alian renkontiĝon okaze de la veno en le Havre de la Esperantistoj el SOUTHAMPTON la 11an de septembro.
Ni provos helpi la lernulojn kaj grupojn per prelegoj, k.t.p....

Bulteno :
Ek de 1977, Sro Lemarchand ne plu povos zorgi pri ĝia redaktado kaj tajpado de la stencilojn Sro GIRAUX daŭre preparos la banderolojn, kaj Sro GUERRE tajpos la stencilojn kondiĉe ke oni disponigu lin pri skribmaŝino, sed oni devos trovi redaktoron.
Sro Lemarchand daŭre zorgos pri la dissendado de la bultenoj kaj la leĝaj deponoj, plie li ĉiam redaktos la internajn cirkulerojn.

La kunveno finiĝis je 12h30 por ke la 34 ĉeestantoj povu gaje, kunhumore komune tagmanĝi.

=-=-=-=-=-=

## Estrara Kunsido de U.N.E.

YVETOT 12/6/76

Tiu kunveno okazis ĉe Gesoj POTTIER tuj post la ekzamena sesio. Sro QUILLAUD malfermis la kunvenon je la 17h30.

Leĝoprojekto :
Sro QUILLAUD legis leteron de Sro MICHEL deputito en Eure kiu respondis favore al la letero sendita de U.N.E. Entute nur 10 deputitoj respondis.

Raporto pri la ĝenerala kunveno en YPORT
La Jara Renkontiĝo estis kontentiga laŭ ĉiuj vidpunktoj krom la partopreno, iom malpli nombra ol pasintjare, kaj lasis 248,50 F da profito.

Zamenhof-Tago :
Ĝi eble povos okazi ĉi-jare en la Junul-gastejo en ROUEN la 12an de decembro.
La ĉefa problemo estas la distra parto.

Bulteno :
La venonta numero aperos tre baldaŭ. Ni devos trovi skribmaŝinon por tajpi la bultenon venontjare.

Venonta ĝenerala kunveno:
Ĝi eventuale povos okazi en LITRY apud Bayeux en libertempa domo por lernejanoj.

Akcepto de la Angloj en Le Havre la 11/9/76 :
Ne okazos tiam oficiala renkontiĝo de U.N.E. sed la privata partopreno de multaj Esperantistoj estas dezirata.

Estraro :
La estraranoj konservas sian antaŭan postenon.

Venonta estrara kunveno :
Ĝi okazos la 25an de septembro, eble en la regiono de Caen kaj Livarot.
Fermo de la kunveno : 18h45.

AGRABLAJN SOMER-FERIOJN !

**Monataj Kunvenoj :**


20.03 = Silvio prezentis al ni sian studon pri la " Eksterhomaj Estaĵoj " . El tiu vasta temo estas malfacile distingi inter la veraĵoj kaj la fantazioj . De la marserpentoj ĝis la " Flu--gantaj Subtasoj " ŝi revuis aron da nekredeblaĵoj al kies demandoj neniu kapablis proponi valoran respondon !

24.04 = Tre interesa estis la raporto de Ges-roj P.Mary,pri vojaĝo al Portugalio. Tipaj afiŝoj ornamis·la ejon ,kaj, ekspozicio de objektoj, manfaritaj en la lando , impresis per sia delikateco.En unua parto de l'programo , estis prezentitaj filmoj de S-ró Langlois,kiujn komentis lia edzino ; samtempe originala muziko kreis la etoson.En dua parto,serio da bildoj pri diversaj urboj , loĝantoj , kaj metioj , konatigis al ni la sudan parton de Portugalio kun komentoj de S-ro P.Mary . Denove muziko kaj kantoj el kiuj kelkaj esperantigitâj tekstoj estis legataj de Klara .

15.05 = " Esperantistaj memoraĵoj el kaptiteco " estis la temo de la parolado de S-ro Noël: Dum la lasta militepoko , nia amiko , dank'al sia verda stelo , kroĉita ĉe l'milita ĉapo, renkontis multajn Samideanojn ,en plej diversaj cirkonstancoj aŭ lokoj: ĉu francajn , en nia lando, aŭ en militkaptitejoj , ĉu germanajn , en Germanio : tiuj estis soldatoj , kiuj ofte traktis lin "Samideane", ĉu en Francio,kie li trovis Germanojn kiuj estis,siavice,kaptitoj !

**Kursoj :**

Daŭre okazas instruado de la lingvo, kun kursoj " hejme " ĉe S-ino Sery (2 lernantinoj) kaj ĉe F-ino Laurence Caron ( 1 lernantino) Kaj kompreneble,nia nelacigebla amiko Chalm dejoras ĉe la Junuldomo kun varia nombro (malgranda) de interesatoj ...



**Akcepto de la Sotanoj :**

( La termino " Sotano " estas mallongigo de la vorto : Southampton-ano )

Kiel anoncite en antaŭaj Bultenoj , la membroj de la Grupo , en Le Havre , preparas la viziton de siaj amikoj Anglaj...

**Provizora Programo**

Sabato 11a de Septembro

- -Frumatene = akcepto ĉe la alveno de la ŝipo
- -Matenfine = akcepto de la urbestro
- -Tagmeze = komuna manĝo
- -Vespere = komuna manĝo kaj distra vesperaĵo

Dimanĉo 12a de Septembro

- -Matene kaj Tagmeze = ĉiu gastiganto zorgas pri siaj invititoj
- -Posttagmeze = komuna vizito de la urbo , kun gvidanto
- -Komuna aperitivo
- -Vespere = adiaŭo ĉe la kajo

Eble, VI estas interesata partopreni en tiuj aranĝoj ?

BONE ! Tiam,skribu al S-ro J.GIBAUX 28 rue Raoul Dufy, 76600 LE HAVRE : Vi ricevos, fine de Aŭgusto,la definitivan programon,la necesajn indikojn por aliĝi al la diversaj partoj de la programo, prezoj , k.t.p. k.t.p. ...

PRIPENSU LA AFERON !!!

## Al la Kongreso de U.F.E. :

Ofte, la Kongresoj kontentigas la partoprenantojn ... Ankaŭ tiu de " La Grande Motte " donis al la ĉe-estantoj plenan kontentigon , krom, tamen , laŭ la vetera vidpunkto . Feliĉe, lundo kaj mardo estis pli sunigataj , kvankam ne kiel kutime en tiu regiono .

Tiuj ne plaĉaj kondiĉoj eble helpis la sukceson de la kunvenoj mem, ĉar pli agrabla estis la restado en salono, ol la promenado ekstere . Ankaŭ la aranĝoj estis tre taŭgaj, kaj la fakto ke la loĝado, la manĝoj, kaj la kunvenejoj estis en la sama loko, multe helpis al la bona etoso de tiu ĉi Nacia Kongreso, kiun partoprenis ĉirkaŭ 200 personoj inter kiuj estis Svisoj, Belgoj, Hispanoj.

La urbestro de "La Grande Motte " akceptis la kongresanojn, kaj oferis al ili gustumadon de lokaj vinproduktoj .

Dum la arta vespero, la Arta Trupo de la Junulara sekcio de Centro - Esperanto - Sabadell, prezentis teatrajon "Ĉu verda , ĉu nigra" de Estanislao Torres, kaj la Teatro de Esperanto de Parizo prezentis la komedion de Florian "2 biletoj". La Esperantistaj Junulinoj de Montpellier prezentis folklorajn dancojn . Ĉiuj interpretistoj meritis laŭdojn kaj ricevis aplaŭdojn .

La nova urbo mem de " La Grande Motte " kun strangaj piramidaj konstruaĵoj, interesis ĉiujn. La arkitekturo, ne kutima, estas moderna, sed bone pripensita, kaj la tuto montras futuran aspekton de novaj urboj. Se, dum vintro , 3.000 personoj vivas tie, dum la libertempa sezono, la nombro atingas 60.000 !

La turisma flanko de la Nacia Kongreso havis bonan sukceson, des pli ke la vetero fariĝis pli suna. La duontaga ekskurso permesis viziti Montpellier , kaj, dum la tuttaga, la 90 partoprenantoj promenis tra la regiono, kun vizito de bela groto kaj romana urbo St-Guilhem-le-Désert kaj, post irado tra stranga ĥaoso de rokoj, tagmanĝis (bonege) en Mourèze .

Pri la laboroj faritaj dum la kunvenoj, kaj la decidoj por la venonta jaro, la franca Esperanto-revuo raportos detale : bonvolu ĝin legi !

Denise kaj André LOISEL ( Rouen )

## Al la Sat-Amikara Kongreso :

Dum pasinta Pasko, mi partoprenis la 31an Kongreson de Sat-amikaro. Ĝi okazis en urbo Martigues , apud Bordozo (Bordeaux) .

Gratulinda estas la Organiza Kongresa Komitato, ĉar ĉiuj aranĝoj estis perfektaj ! Ni estis akceptitaj en " La Maison du Progrès Social "kiu apartenas al la Bordoza urbo, estas administrita de sindikatoj, kaj superkontrolita de la prefektejo. Ĝi situas en granda parko ; ĉio estas trovebla en tiu domo : granda ĉambro por konferencoj, multaj dormo-ĉambroj, restoracio, k;t;p;


Kiel en ĉiuj Kongresoj, estis du aspektoj : Laboro kaj ... Plezuro . La laborkunsidoj estis vizitiaj je 90 % . Seriozaj diskutoj kaj klarigoj, dum kiuj mi denove estis feliĉa aŭdi la belan kaj fluan lingvon ! La problemoj rilatas al la mono . Ankaŭ oni debatis pri propagando . Precize pri tiu temo , delegitaro de kongresanoj estis invitita de la Radio-stacio Aquitaine por preskaŭ duonhora dissendo . Ni notu ke, el la delegitaro, estis pluraj eksterlandanoj, kaj eĉ geedzoj el Esperantio : li, estas Germano, ŝi, Japanino, kaj, kun la du infanoj, ili kvar parolas en Esperanto = Bonega propagando !

Pri la plezuro, ni diru ke multo estis aranĝita ! ĉiuvespere, okazis diversaj distraĵoj: kantoj, skeĉoj fare de junaj Esperantistoj, dancoj, kaj amuza monologo de partoprenanto kiu rakontis ke, ne trovinte la akceptejon , li eniris preĝejon, kaj tie komprenis nenion en tia Esperanto ! ... ni multe ridis ! Pariza trupo prezentis ekstraktojn el "Andromako" . Okazis mallonga ekskurso al Bordozo, kaj alia tuttaga al Arkaŝono: tiu lasta permesis gustumi ostrojn, akompanitajn de blanka vino , kompreneble !

Jen karaj amikoj, miaj kelkaj memoraĵoj... mi tre dezirus ke, iun fojon, ni konu en Normandio Kongreson kun tia sukceso !

Roberto LETAILLEUX (Le Havre )

# LA PONTEGO DE TANCARVILLE




## MODERNA VIDINDAĴO EL NIA REGIONO

Ĝi estas pendpontego kiu ebligas transiri la riveregon " Seine " je 25 Km proksimume, oriente de Le Havre. Antaŭe oni povis trairi la riveregon nur per pramoj, aŭ sur pontoj nur en Rouen kiu situas je 90 Km de Le Havre.

Kelkaj rimarkindaĵoj : - la planko kuŝas je 50 m. super la nivelo de la plej altaj akvoj de la riverego.

- la centra intertrabo longas 608 m, eŭropa rekordo.
- je la ekstremoj, ĉiu intertrabo longas I76 m.
- la alteco de kableltenantaj pilieroj estas I23 m.; tio prezentas la mondan rekordon pri alteco de betona piliero.

Sur la maldekstra bordo, la pontego estas daŭrigata per viadukto enhavanta 8 spanojn( 50 m. po ĉiu ), por nuligi la gravan nivelan diferecon ekzistantan inter la pont-planko kaj la marĉo " Vernier " kie la vojo rekontaktiĝas kum la tero.

Koncerne la venton, oni kontrolis ke la ponto kapablas rezisti kontraŭ vento rapida je I50 m/sek. ( 540km po horo ), tio reprezentas la trioblon de la plej forta vent-rapideco konata ĝiś nun.

Construction du Pont de Tancarville.

du I5 nov. I955 au 3 juil. I959

3.477.000 heures de travail

Aucun accident mortel

### FUNDAMENTAJ LABOROJ.

Sur la dekstra bordo, la klifo de Tancarville estas preskaŭ samnivela kun la pont-planko, kaj la grundo estas malmola.

Male, sur la maldekstra bordo, sterniĝas aluvia ebenaĵo, sorbigita de Seine-akvo kaj la malmola grundo troviĝas je 23 m profunde.

I° - Ŝarĝoj relative malpezaj : oni uzis fostojn batitajn per vapormartelego. Tiuj fostoj serie fabrikitaj, longaj je 22 m, pezis I2 tunojn po ĉiu.

2° - pezaj Ŝarĝoj : pro la konsistaĵo de la grundo estis malfacile starigi fundamenton firman je 23 m profunde.

Oni konstruis specon de kestego senfunda sur la tero, el armita betono kun internaj vandoj formantaj alveolojn. Kiam tiu ĉi konstruaĵo atingas altecon de 8 m., oni fosas la teron de la alveoloj per skrap-gruoj; la akvo-fluegado elfosas la grundon sub la alveol-vandoj de la kestego kaj tiu ĉi per sia propra pezo descendas, centimetron post centimetro; poste per sinsekvaj aranĝoj, oni plilongigas la vandojn kaj la malsuprenirado de tiu kava amasego tre zorge

.../...

.../...

Gvidata, daùras.

Tamen, pro la profundo, je momento okazis ke la malsupreniro haltis. Estis necese fosi 2 aù 3 lastajn metrojn pere de laboristoj laborantaj ĉu en skanfandroj, ĉu en plonĝkloŝego.

Post la fina surlokigo, betono estis enmetita por balastigo kaj senmovigo de la fundamento.

KOLONEGOJ de la viadukto.

Tiuj distancaj je 50 m., kies la plej proksima al ponto estas alta je 37 m., estas kavaj : la vandoj dikas nur 20 centimetrojn sed la formo alveolita kaj la armaturo zorgita donas grandan rigidecon kun materio-ŝparo.

| |
|---|
| Béton : cube total : 60.000 m3.<br>Cables porteurs : diamètre moyen 0m60<br>Longueur d'un ancrage à l'autre : I.066 m.<br>Poids total : 3.200 t.<br><br>Charpente métallique : poids total 7.500 t.<br>Surcharges admissibles sur les travées suspendues 5.700 t. |

VIADUK – TRABOJ :

Ĉiu el la 8 spanoj 50 m. longaj, enhavas 5 identajn trabojn, serie fabrikitaj en proksimaĵo.

Karakteraĵoj de tiuj traboj : longo 50 m.

"I" profilo, alto : 3 m., dikeco : 16 cm. nur.

Spite je tiu nekredebla svelteco, la pezo estas 120 tunoj.

KoMo k FoGo .

daùrigota

o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o

# KASRAPORTO

Laù informoj de nia ĉiam agema kasisto Sro JOUIS , la jara kongreso en YPORT lasis profiton je 248,50 Fr.

La bonhava saldo kiu troviĝas en la asocia kaso, la 12an de junio 76a, estas :
1.640,21 Fr, do jus antaù la eldono de tiu ĉi bulteno.

Dankon al nia amiko Sro JOUIS pro lia laboro.

Tutsame, ni deziras danki s-inojn GONTARD el Le Havre kaj LOISEL el Rouen kiuj zorge kaj akurate kontrevizis la buĝeton de la asocio.

o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+

Nuntempe, suno daùre brilas ! Sed jam estas tempo pripensi pri via aktiva partopreno al nia venonta :

# NIA VIVO EN ...

## YVETOT

La kursoj kontentige daùras kaj finiĝos fine de junio.

La 12an de junio okazis ekzamsesio : 5 personoj : (2 el YVETOT kaj 3 el Grand QUEVILLY) trapasis la Ateston pri Lernado. La rezultoj ankoraù ne estas oficiale konataj.

o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o


NE FORGESU VIAN JARAN KOTIZON AL
U. N. E. : 5,00 Fr minimume . DANKON !
UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE
C.C.P. : ROUEN – 283 – 40 H.

o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o+o

# ZAMENHOFA RENKONTIĜO

kiu okazos en :

la JUNULGASTEJO de ROUEN , sabaton la 11an kaj dimanĉon la 12an de DECEMBRO 76a !!!




Tiam okazos vere alloga programo, ĉiam en gaja kaj simpatia etoso !
kun prelegoj , diskutoj , vizito de muzeo ,
muziko , danca vespero, kun gustumado de krespoj ,
projekcioj de lumbildoj kaj esperebIe de esperanto-filmoj ,
intensa unuagrada esperanto kurso , k.t.p........

Jam rezervu tiujn datojn; ĉiuj utilaj informoj kaj aliĝiloj aperos en la du venontaj numeroj.